

la
verda
stelo



**ESPERANTO
NEDERLAND**

**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

septembro 2011



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72

retadreso:

johan.swenker@xs4all.nl

sekretario

s-ino N.R. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 60
9728 VV Groningen
tel. +31505251436

retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro L. Staghouver
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. +3150 301 40 15

retadreso: luitstaghouver@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72

retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker,, N.R.Kiel-Klunder
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



Enhavo

- 3 ... Klubkunvenoj
- 4 ... Naskiĝtagoj
- 5 ... Pri la nordo
- 9 ... Korespondado
- 9 ... Ferii per kongresoj
- 11 ... La revenbileto
- 13 ... Kongreso en Kopenhago
- 14 ... Glitkalkulilo

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2010

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op Ing banknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND.

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:
78 68 44 167 (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland, Middenweg
587, 1704 BH Heerhugowaard.

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 30,50
Gezinslid	€ 8,00

Klubkunvenoj

septembro

- 1 pri la ferioj
- 15 statuoj en Groningen
- 29 poemoj

oktobro

- 13 malferma vespero
- 27 gastpreleganto

novembro

- 10 proverboj
- 24 gramatiko

decembro

- 8 festvespero

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia retejo
sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

septembro

- 3 s-ro W. Akkerman
- 5 s-ino B. Brink
- 6 s-ino A. Bijl
- 7 s-ino Kruijswijk
- 17 s-ino van Hogen-Cornelissen
- 24 s-ino van der Heij-Alblas
- 30 s-ino Thomas-Nitzsche

oktobro

- 2 s-ino Koopmans-Hollenga
- 3 s-ro van der Heijden
- 15 s-ino Behr-Kunst
- 29 s-ino B. Dodebier

decembro

- 1 s-ro R. Hofman
- 15 s-ro Molthoop
- 17 s-ro Geertsema
- 21 s-ino Leeuwerke-Kiers
- 30 s-ro Hettinga
- 31 s-ro van der Heij



GRATULON !

Pri la nordo

31 marto

La preparo por la kunveno de la 31-a de marto estis iomete stranga. Unue ŝajnis, ke preskaŭ neniuj venos. Almenaŭ du personoj, kiuj ĉiam venas, malanoncis sin. Samtempe du interretaj lernantoj de Koos anoncis, ke ili estas apude kaj volas veni. Kion fari?

Finfine ni anoncis, ke estos kunveno precipe por komencantoj, kiuj volas paroli en malgranda grupo. Tio

sukcesis, ĉar venis entute ok personoj. Inter ili la lernantoj de Koos.

Ni komencis per laŭvica sinprezento, por ke ĉiu iomete ekkonu la aliajn. Ni ludis diversajn lingvajn ludojn, interalie *domiling*. Tio estas domengludo kun bildoj kaj vortoj. Ni uzis ĝin precipe por konversacio. Tiam ege helpas, ke la bildo simple montras akvobirdon, kaj oni rimarkas nur poste, ke ekzistas diferenco inter anaso kaj ansero.



Ni ludis ankaŭ skrablon. Ne sur la tabulo, sed simple sur la tablo. La celo do ne estis kolekti poentojn sed fari vortojn. Tio estas sufiĉe malfacila, kiam la vokaloj hazarde aperas nur fine de la ludo.

Dum la kunveno envenis Tiny Bulk. Ŝi jam delonge estas membro de nia klubo. Ŝi kunportis foton el 1975. La foto montras Jaques Wallage, kiu tiam estis skabeno pri kulturo.



Staras de maldekstre : s-ro Abbas, ?, s-ro van der Horst, s-ro Koning, ?

Ĉu vi scias la aliajn du nomojn?

14 aprilo

La ĉeftemo de la kunveno estis *solvi enigmojn*. Sed kiel kutime ni unue parolis pri vetero kaj cetero.

Wil aliĝis al pentekosta renkontiĝo.

Johan ne jam ricevis konfirmon pri nia partopreno en la liberiĝfestivalo en la urba parko de Groningeno.


Luit iom parolis pri la daŭre malfacila situacio de la konga studento-rifuĝinto *Joseph* en Pollando.

Wil trajne veturis al Enschede por viziti amikino en hospitalo. Ĉar ŝi decidis ne reveturi al Groningeno laŭ la sama vojo, la hejmenveturado iĝis interesa aventuro.


Nelly estis en *Bristol* (Anglio). Ŝi estas membro de ĥoro kaj ili prezentis sin tri fojojn en du tagoj. Nelly ankaŭ veturis al Roterdamo por ĉeesti prezentadon de la filino, kiu tie studas ĉe la konservatorio.

Antaŭ ol Wil povis disdoni folion kun dekon da enigmoj, Luit montris libron,

Ĉu vi konas dolortermometron por infanoj kaj por plenkreskaj personoj? Gonda kunportis tian simplan, sed tre utilan aparaton.



Unuflanke la malsanulo ŝovas la indikilon tiel, ke ĝi indikas kiel gaja li aŭ ŝi estas.



Aliflanke la flegistino vidas dolorskalon kaj povas noti la gradon en la dosieron.

12 majo

La lasta kunveno de la sezono ĉiam okazas komuna manĝado. Ĉi-jare ni, kiel ofte, iris al *Il Lago*, itala restoracio apud nia kunvenejo. Ni estis naŭope sed mendis nur ses picojn kaj petis tranĉi ilin en pecojn. Tiel ĉiu povis gustumi ĉiajn picojn. La kelnero ŝajnis, ke li tion komprenas. Sed laŭ mi la vario povus esti pli granda.

Antaŭ multaj jaroj, kiam ni iris unuafoje al *Il Lago*, mi ankoraŭ hontis, kiam mi mendis malpli da picoj ol la nombro da personoj. Sed nun mi scias, ke ni tamen mendas sufiĉajn aliajn varojn, kiel glaciaĵo kaj antaŭmanĝaĵo.


Borsojn

Ĉiun jaron nia klubo sin prezentas dum du aŭ tri borsoj. La 5-an de majo ni estis en *Stadspark* dum la liberiĝfestivalo. Mi

memoras nur, ke mi aŭdis kaj vidis *Willeke Alberti*, ho jes, kaj kompreneble ni parolis kun kelkaj homoj pri Esperanto.

La 17-an de aŭgusto ni estis sur *Vismarkt* dum la kultura festivalo de KEI-semajno. KEI estas la inaŭgura periodo por novaj studentoj en Groningeno. Jam antaŭ ol la budo estis vere preta, virino alproksimiĝis kaj demandis pri nia klubo. Ŝi studis lingvosciencan en Amsterdamo kaj verkis sian eseon pri Esperanto. Ŝi jam havis vortaron ktp. Ŝi do interesiĝis pri la lingvo kaj eble iĝos lernanto ĉe Wil.

Estis dua persono, kiu ankaŭ plenigis nian aliĝilon. Tria persono diris al ni, ke li kaj lia edzino volis lerni lingvon ekde septembro. Li elektis Esperanton, kaj la edzino la francan. Tamen li ne volis plenigi la aliĝilon. Do Wil bedaŭrinde ne povis inviti lin por konatiĝa kunveno.



QR-kodo, kiu kondukas inteligentan telefonon rekte al la kursoj de Koos kaj Wil.

Someraj Renkontiĝoj

Dum la pasinta somero ni havis tri renkontiĝojn dumtage. La unuan fojon ni trinkis kafon en *Schimmelpenninckhuys*. Ni sidis ekstere en la ĝardeno. Venis sufiĉe da homoj, ni devis preni almenaŭ unu seĝon de alia tablo. Kiel kutime dum la someraj renkontiĝoj, ni babilis en la nederlanda lingvo.



Sur la foto videblas la kvin ĉeestantoj. Rimarku kiel intense la suno brilas. Estis vere somera tago por la somera renkontiĝo.

La dua renkontiĝo estis en *Scandinavisch Dorp*. Ĉeestis *Catherine* kaj ŝia filo *Nils*. *Catherine* estas franca amikino de *Ineke*. Ŝi estas esperantisto, *Nils* lernas Esperanton. Laŭ *buienradar.nl* pluvus, kial ni restis en la konstruaĵo. *Nils* eliris kelkfoje, mi (*Johano*) akompanis lin unufoje. La vetero do tamen estis sufiĉe bona por iomete promeni. Ekstere ni parolis, en la angla, pri tradukado de komputilaj programoj en Esperanton. Fakte por *Nils* tio estas la celo lerni Esperanton. Li vidas ligojn inter Esperanto kaj libera programaro, kiel *Linukso* kaj *OpenOffice*: ambaŭ celas

plibonigi la mondon kaj ambaŭ estas idealismaj.

Post la renkontiĝo ni lunĉis en *Scandinavisch Dorp*. Kelkaj homoj jam iris hejmen, ni tamen restis sesope. La kunveno estis do tre sukcesplena. La lasta somera renkontiĝo estis pikniko apud la *Dreesflat*. La vetero estis multe pli bona ol pasintjare. Tiam ĵus ĉesis pluvi, sed tamen tre ventis. Ĉi-jare la suno brilis kaj ne tro forte blovis la vento. Samkiel pasintjare *Tiny Bulk* venis por iom babili. La plimulto el la groningenaj esperantistoj estis ie en Eŭropo. Venis nur tre malmultaj personoj, sed ankaŭ tio povas esti agrabla.



Ĉu vi rimarkis, ke ni povis esti ekstere dum ĉiu somera renkontiĝo? Do memoru, ke ni vere havis minimume kelkajn somerajn tagojn dum la pasintaj monatoj.

Korespondado

Antaŭ multaj jaroj vizitis nin en Groningeno bulgaro, *Ivan Shiskov*, korespondamiko de *Hans kaj Pauline Reddingius*. Ili prizorgis por li okulooperacion en Belgio. De tiu tempo li kontaktas, unue skribe kaj poste rete, ankaŭ kun *Adri Oosterwijk* kaj kun Wil. Li estas bona kaj aktiva esperantisto.

Ĉar lia vidkapablo ne plu estis bona, li iĝis ano de grupo de vidhandikapuloj en sia loĝurbo Dubrovnik.

Li klopodis entuziasmigi samklubanojn lerni Esperanton. Du el ili konsentis. Por ili li trovis instruistinon.

En la lasta retmesaĝo de Ivan li skribis jenon:



La Esperanto-kurso en la Klubo de la blinduloj en nia urbo sukcese finiĝis. Hieraŭ ni faris foton de la partoprenantoj, kopion de ĝi mi sendas al vi, kun peto, se eblas, presi ĝin en vian revuon, La Verda Stelo. La junulo maldekstre sur la foto estas tute blinda, sed tre bone asimilas materion kaj provas jam paroli. Li estas studento ĉe la Teknika Universitato en nia urbo kaj tre sukcese partoprenas la ekzamenojn. La virino en la mezo de la foto volas korespondi kun eksterlandanoj. Mi petas, se estas eble, trovi por ŝi iun esperantistinon, kiu volas korespondi kun

ŝi. La virino dekstre sur la foto estas la instruistino.

Iom pli da informoj sekvis pri la korespondpetantino, kiu estas ne tute blinda:

Ŝi nomiĝas *Veska Janeva*, estas 61-jara, kaj ŝia retadreso estas vivian30@abv.bg. *Wil van Ganswijk*.

Ferii per kongresoj

Per nokta aŭtobuso mi alvenis frumatene la 23-an de julio 2011 en Kopenhago en la komenctago de la UK 2011.

Post kiam mi estis metinta mian kofron en mian hotelon, mi iris al la kongresejo, je distanco de unu kilometro. Tie ni povis ricevi la bezonatajn paperojn por la kongressemajno. Tuj mi jam renkontis kelkajn amikojn kaj konatojn.



Vespere oni povis viziti multajn budojn pri ĉiaj Esperanto-aktivaĵoj en diversaj landoj. Mi asistis en la budo de *Esperanto Nederland*.

En la ricevita programlibreto mi jam tiam markis programerojn, kiujn mi ŝatis ĉeesti. Kulminoj de la kongreso estis ĉi-jare por mi la nacia kaj internacia vesperoj!

La vetero estis la tutan semajnon malbona, escepte de la ekskursotago. Tiam mi vizitis per aŭtobuso la urbojn *Malmö* kaj *Lund* en la sudo de Svedio. Tiu ekskurso tre plaĉis al mi!

Unu tagon post la malfermo de la kongreso mi flugis de Kopenhago al Prago. Tie mi gastloĝis pere de Pasporta Servo dum du noktoj ĉe tre simpatiaj gastamaj esperantistino kaj amiko.



Tiel mi povis esplorigardi Pragon dum tuta tago. Antaŭajn fojojn mi vizitis la urbon nur dum kelkaj horoj.

De Prago mi iris trajne al *Poděbrady* por tie partopreni KELI-kongreson.

Sur la kajo de la stacio en Prago mi renkontis *Ake Ahlren* el Svedio, 93-jara kaj la plej aĝa partoprenanto de la kongreso. *Andreo Aradsson* el Hungario, preskaŭ kvinjara, estis la plej juna inter ni.

El la 56 partoprenantoj el 16 landoj mi jam konis sufiĉe multajn personojn. Tio estas tre agrabla kiam oni sola ferias.

Estis tre bone organizita kongreso, multe

da variado inter la prelegoj kaj ekskursoj. Estis agrablaj vesperprogramoj kun prezentadoj de gimnazia kantgrupo, popoldancgrupo, du operkantistoj.



Je la adiaŭa vespero montriĝis, ke estis multaj talentuloj inter ni. Germana amiko kaj mi prezentis dialogon, kiun mi antaŭ nelonge ricevis de konato el Usono kaj tradukis en Esperanton. Ĝi estis sprita! La vetero estis la tutan semajnon sufiĉe bona.

En la dimanĉa diservo okazis bapto kaj Sankta Manĝo. La ĉeĥa prediko estis tradukita de *Pavel Polnicky* en Esperanton, same kiel la alparolo de la urbestro dum akcepto en la urbdomo kaj la vortoj de estrino de muzeo dum la malfermo de tiea Esperanto-ekspozicio. Cetere Esperanto estis la parolata lingvo! Estis agrabla interesa semajno! La hejmiradon al Groningeno mi faris per trajnoj kaj flugmaŝino. Kvankam antaŭe la feriovojaĝo ŝajnis al mi iom komplika, tamen ĉio evoluis sufiĉe glate kaj kun multe da plezuro mi rerigardas al miaj kongresaj/feriaj semajnoj.

Wil van Ganswijk-Vlasblom.

La revenbileto

Sinjoro Eldakoler paŝas al la biletvendeja giĉeto en stacidomo. Tie deĵoras sur alta seĝo malalta sinjoro, konvene nomata s-ro Etul.

s-ro Eldakoler: Bonan tagon, ĉu ĉi tie oni vendas biletojn?

s-ro Etul: Jes, certe, sinjoro. Rigardu la afiŝon: "Biletoj". Kien vi volas iri?

s-ro Eldakoler: Hejmen.

s-ro Etul: Jes..., hejmen. Pli precize, mi petas. Kie estas via hejmo?

s-ro Eldakoler: Kie? Nu, najbare de la parko kun la naĝejo kaj sporthalo, malantaŭ la meblofabriko, inter...

s-ro Etul: Kaj sendube bela kvartalo. Sed malpli precize, mi petas. En kiu urbo vi loĝas?

s-ro Eldakoler: Flusurbo.

s-ro Etul: Flusurbo. Bone. Bileto por la unua klaso aŭ la dua klaso?

s-ro Eldakoler: En la dua klaso, mi petas.

s-ro Etul: Ĉe fumantoj aŭ nefumantoj?

s-ro Eldakoler: Ĉe nefumantoj, mi petas.

s-ro Etul: Kun fenestra aŭ koridora sidloko?

s-ro Eldakoler: Kun fenestro, mi petas.

s-ro Etul: Ĉu vi petas unudirektan aŭ revenan bileton?

s-ro Eldakoler: Revenan, mi petas.

s-ro Etul: Bone, dek du dolarojn kvindek, bonvolu.

s-ro Eldakoler: Kio? Tiom multekosta? Mi havas nur dek dolarojn kun mi. Kiam mi venis, mi pagis nur ses dolarojn dudek kvin.

s-ro Etul: La duonon.

s-ro Eldakoler: Precize la duonon. Tiom alta ne estas inflacio!

s-ro Etul: Klare! Sed tiukaze, sinjoro, vi evidente aĉetis unudirektan bileton.

s-ro Eldakoler: Kaj precize tion mi volas

aĉeti nun.

s-ro Etul: Ho, pardonu, sinjoro. Mi miskomprenis vin. Mi kredis, ke vi volis aĉeti revenbileton.

s-ro Eldakoler: Jes, mi ja volas aĉeti revenbileton.

s-ro Etul: Do, la prezo estas la duoblo: dek du dolaroj kvindek.

s-ro Eldakoler: Sed ne, mi volas veturi nur unudirekte.

s-ro Etul: Pardonu, sinjoro, mi vere ne komprenas. Kion vi deziras precize...? unudirektan aŭ dudirektan bileton?

s-ro Eldakoler: Unudirektan.

s-ro Etul: Do, la prezo estas la duono: ses dolaroj dudek kvin.

s-ro Eldakoler: Bonege. Tiom mi povas pagi. Sed, ĉu ĝi ja estas revenbileto?

s-ro Etul: Ne! Kompreneble, ke ne.

s-ro Eldakoler: Do, tio ne taŭgas por mi. Mi nepre volas revenbileton.

s-ro Etul: Sinjoro. Ne stultumu! Ne diru stultaĵojn! Ĉu vi volas unudirektan bileton aŭ revenbileton?

s-ro Eldakoler: Ambaŭ!

s-ro Etul: Kion?

s-ro Eldakoler: Ambaŭ! Mi volas unudirektan revenbileton!

s-ro Etul: Sed... sed...

s-ro Eldakoler: Mi volas reveni unudirekte!

s-ro Etul: Sinjoro, vi mokas min.

s-ro Eldakoler: Male. Mi vokas vin. Vendu al mi unudirektan revenbileton!

s-ro Etul: Vi diras absurdaĵon. La du estas reciproke ekskluzivaj!

s-ro Eldakoler: Eks... Eks-klu-poke reciklivaj? Ne konfuzu min per ĵargono! Vendu al mi bileton!

s-ro Etul: Mi ne povas vendi al vi bileton.

s-ro Eldakoler: Ne povas? Kial ne? Rigardu la afiŝon: "Biletoj".

s-ro Etul: Sinjoro, bonvolu elekti: vi aĉetu

unudirektan bileton aŭ revenbileton, unu aŭ la alian. Bonvolu foriri de mia giĉeto kaj revenu kiam vi decidis. Mi devas vendi biletojn al aliaj klientoj.

s-ro Eldakoler: Kaj postuli de ili la duoblan prezon! (*ekkrias*) Tiel la fervojo gajnas sian monon! Tial la popolo estas malriĉa!

s-ro Etul: Gardistoj! Bonvolu forporti ĉi tiun sinjoron. Mi devas servi al seriozaj klientoj.

s-ro Eldakoler: Seriozaj?? Seriozaj!??

s-ro Etul: (*krias*) Jes, seriozaj!

s-ro Eldakoler: Nun vi krias al mi! Tion mi ne toleras! Ili kriis al mi en la poŝtofacejo, koleris pri mi en la banko, insultis min en la vendejoj, elĵetis min el la muzeo. Nun, vi ĉi tie en la stacidomo, krias kaj insultas min! Terura urbo estas ĉi tiu. Mi volas reveni hejmen! Nur tion mi volas. Ĉu vi ne povas kompreni tion?


s-ro Etul: Vi volas reveni hejmen. Nur tion?

s-ro Eldakoler: Jes, reveni hejmen, kaj neniam plu viziti ĉi tiun teruran malafablan urbon.

s-ro Etul: ...Reveni hejmen...

s-ro Eldakoler: Tial mi petis revenbileton!

Aperis en Juna amiko 2002/2. Bildo de Pavel Rak, Ĉeĥio.



Kongreso en Kopenhago



Kelkaj groningenaj esperantistoj estis en Kopenhago dum la 96-a Universala Kongreso de Esperanto.

Ili sendis karton al vi, la membroj, kiuj ne ĉeestis. Ĉu vi povas deĉifri la subskribojn? Subskribis ne nur la groningenaj esperantistoj, sed ankaŭ aliaj konatoj.

96-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO KOPENHAGO 2011

Tre kore salutas vin
el Kopenhago:

Wil van Gemwijk - Vlasbla

Wiebren Akkerman

Gerit Buijs

Nanne Kalma

Aus Bekker - ten Hagen

Hans Bekker

Ache Jorke

Irene

Estas 1450 partoprenantoj

Fotistoj: Mikkel Grønlund

el 66 landoj



Dana Esperanto - Agencia - www.esperanto.dk

Al la anoj de la
Esperanto-klubo Groningen
P/a Gesuijoroj Staqtouwer
Julianalaan 25
NL 7901 ED Bedum
Nederland


A13U

7981ED

Produktion: grønlunds - nr. EU 2011/107

Glitkalkulilo

Antaŭ kelkaj monatoj Gonda demandis Johan pri kiel funkcias glitkalkulilo. Tial la programo de iu vespero estis *iloj*. Johan kunportis paperan glitkalkulilon, kiun vi mem povas fari. Sekvu nur la instrukcion en la desegnaĵo. Sed eble antaŭe kopiu tiun paĝon de la informilo.




Sur la foto vi vidas 2 rolveblajn mezurilojn. Mi metis ilin tiel, ke ĝi komputas la adicon "2,5 plus 3,3". Ĝi fariĝas 5,8, kiel indikas la krajono. Tio estas simpla ĉiutaga afero: ni povas adicii longojn.

Eĉ per la elementlerneja metodo, adicii ne daŭras longe. Sed antaŭ la veno de la modernaj elektronaj komputiloj multipliki estas tre temporabe. Se ni havus nur mezurilojn kun fremda skalo, tiel ke unu apud la alia fariĝus multiplikilo, samkiel el du normalaj mezuriloj fariĝas adiciilo. Sed tio fakte eblas. Komence de la 17-a jarcento, *Napier* malkovris la logaritmon. Logaritmoj havas la tre utilan eblon, ke ili ŝanĝas la malfacilan multiplikon en pli facilan adicon. Tuj post la malkovro de la logaritmo aperis la unuaj glitkalkuliloj: do logaritmaj skaloj, kiuj povas gliti unu laŭlonge de la alia.

Multipliko per glitkalkulilo do similas adicon de distancoj. En la meza lernejo, komence de la 70-aj jaroj, mi ankoraŭ lernis la fajnajn lertaĵojn de la glitkalkulilo, kiel dividi kaj multipliki kiam la rezulto estas pli granda ol 10. En nia lernejo ni havis eĉ grandegan glitkalkulilon por instrui la uzadon de glitkalkulilo.

Sed post nelonge ĉiu lernanto posedis elektronan poŝkalkulilon, kio estis la fino de la arto uzi glitkalkulilon.






Fari indikilon

Cliff Stoll / Acme Klein Bottles
Chris Hamann & Nancy Shaw

Uzu supran indikilon por mezuri du pecojn da travidebla glubendo.
Faru unu pecon same longa kiel la nigra linio, kaj la alia same longa kiel la ruĝa


Metu la gluajn flankojn unu sur la alian.



Desegnu linion en la mezo.



Faldu la glubendojn ĉirkaŭ la glitkalkulilo.
Uzu la gluajn finon por finkonstrui la indikilon.



Due tranĉu ĉi tie

Unue tranĉu ĉi tie

Parto

Trie faldu parton A laŭlonge de la punktolinioj

B Kvare ŝovu parton B en la falditan parton A



Designed by ChriNaTECH
Tradukis Johan Swenker

Kvine faru la indikilon laŭ la ordonoj supre.

(Aŭ simple uzu kvin-centimetran paperklipon kiel indikilon)

Invented in the USA
by Acme Klein Bottles

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO – taal zonder grenzen